


Bulgaria **ESPERANTISTO**



9
1970

ENH AVO

Ivan Sarafov. Ni organizu bone la novan lernojaron!	1
* * * Granda akiraĵo de la esperantistoj-instruistoj	3
* * * Instruista internacia konferenco en Maribor	3
* * * Sciencistoj diskutas nomojn por vivaĵoj el aliaj mondoj	3
* * * 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno	4
* * * Esperanto — turisma lingvo	5
D-ro Franz Jonas. Salutparolado antaŭ la 55-a UK	6
Ĥristina Veceva. La dua komuno en la mondo	7
Ivan Draganov. Mia amiko Jean Monnier	8
Roman Kudlik. Prometeo	9
Laszlo Benjamin. La kaskado de la reĝino.	10
Velko Rusinov. Esperanto en la malliberejo	11
Ĵeko Zaprjanov. E-kurso por instruistoj en Ĥaskovo	13
Kunĉo Vâlev. Brila sukceso de la specialigitaj porinstruistaj E-kursoj	14
Herbert Pilzecker. Berlino — ĉefurbo de GDR	16
* * * Por la nova esperantisto: La trezoro	17
Dimitr Mutuŝev. Memore al niaj E-heroj Vela kaj Stoju	17

Sur la kovrilpaĝo:

La inaŭguro de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio—1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj; 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigitaj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fiko, R. Kongresi Përmetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109

**NI ORGANIZU BONE LA NOVAN LERNOJARON!**

La Plenkunsido de CK de BEA en novembro 1959 tuŝis plej serioze la problemon pri la kursa laboro, ĉar ĝi estas decida por la plua disvolviĝo de nia Asocio. Se ni bone kaj ĝustatempe organizos la kursojn, la Movado ricevos novan puŝon antaŭen. Lastatempe oni tre akre sentas la bezonon de certe bonaj E-instruantoj. Plej certe, plej rapide ni atingos sukcesojn, se ni serĉos tiujn instruantojn inter la profesiaj instruistoj, ĉar ili metodike estas bone preparitaj, konas la metodikajn postulojn por plensukcesa instruado kaj pli facile orientiĝas en la malfacila tasko de lingva instruado.

La profesiaj instruistoj havas ĉiutagan senperan kontakton kun granda parto de junularo. Krom tio, se ni konkeros solidajn poziciojn inter la profesiaj instruistoj, tiam ni povos plifaciligi ankaŭ eventualan oficialan enkondukon de la instruado de Esperanto en la bulgaraj lernejoj.

CK de BEA organizas la disvastigon de Esperanto inter la profesiaj instruistoj per konstanta kaj sistema laboro tiurilate. Multaj distriktaĵ komitatoj bone komprenis tiun noblan taskon kaj komencis sisteman organizan laboron, ĉar la instruistoj sukoese gvidus ne nur lernejajn kursojn, sed ankaŭ ĉiajn ceterajn kursojn — por eksterlerneja junularo kaj por civitanoj.

La unuaj, kiuj frue komprenis la gravecon de la tasko, estis la esperantistoj en Pazarĝik. En la somero de 1963 kune kun la Distrikta Fako „Popola Klerigo“ ili organizis la unuan kurson por E-instruistoj. Ĉiu kurso faris praktikan provlecionon, oni ellernis multajn E-kantojn.

Duaj estis la esperantistoj en Stara Zagora. Per letero №710—2760 de 2. VII. 1965, adresita al la Instituto por Perfektiĝo de la Instruistoj, la Ministerio de la Popola Klerigo permesis al la Distrikta Komitato de BEA en Stara Zagora malfermi 20-tagan kurson de Esperanto por la geinstruistoj en la distrikto.

Triaĵ estis niaj amikoj en Burgas, kiuj en 1966 malfermis kurson por geinstruistoj. Post ili sekvis la kamaradoj en Haskovo (20-taga kurso), en Ruse (trimonata senpaga kurso kune kun la Distrikta Fako „Popola Klerigo“ kaj la Distrikta Komitato de la Asocio de Bulgaraj Instruistoj), en Plovdiv (trimonata kurso, pagita, kune kun la Distrikta Fako de „Popola Klerigo“, la Distrikta Komitato de BEA kaj E-societo „Kulturo“), en Loveĉ (komence de januaro ĝis junio 1967—senpaga kurso).

La 4-an de julio 1967 en Sofio okazis la unua landa konferenco de la instruistoj, kiu decidis, ke estas necese daŭrigi kaj intensigi la laboron inter la instruistoj.

Sekvis novaj porinstruistaj kursoj en diversaj lokoj.

En 1968 en Sofio oni fondis la unuan instruistan E-societon „Dico Petrov“, kiu havas la taskon labori konkrete inter la instruistoj de la ĉefurbo.



Rezulte la Sofia Fakoj „Popola Klerigo“ malfermis 15-tagan E-kurson por instruistoj.

La Distrikta Fakoj „Popola Klerigo“ en Kjustendil decidis provcele fakultative enkonduki la instruadon de Esperanto en kelkajn lernejojn de Kjustendil, Stanke Dimitrov kaj la vilaĝoj Gjueŝevo, Ŝatrovo, Trekljano, Rila, Mârvodol.

La Distrikta Fakoj „Popola Klerigo“ en Blagoevgrad en 1968 rekomendis fakultativan instruadon de Esperanto tie, kie estas kondiĉoj.

La Ministerio de Komunikado per letero № C-7-1023 de 13. XI. 1968 rekomendis la organizadon de kursoj en siaj lernejoj kaj entrepreno.

Novan, tre utilan kaj celkonforman iniciaton montris la Distrikta Komitato de BEA en Sofio. Kune kun la Distrikta Fakoj „Popola Klerigo“ kaj la Distrikta Komitato de la Asocio de Bulgaraj Instruistoj ĝi organizis en 1969 specialajn kursojn — forestan 7-monatan dum la regula lernojaro kaj ĉeestan 20-tagan en la somero. Dank' al la bonaj rezultoj CK de BEA decidis, ke dum la jaro 1970 tiuj kursoj — jam per la helpo de la Instruista Sekcio de BEA — transformiĝu en tutlandajn. Ili ankaŭ estis foresta kaj ĉeesta. En la ĉeesta kurso (en Godeĉ) instruis ankaŭ la mondkonata hungara pedagogo prof. d-ro István Szerdahelyi. Lia partopreno grave plialtigis la nivelon kaj la aŭtoritaton de la kurso. Prelegis ankaŭ nia konata veterano kaj lerta instruanto de Esperanto Atanas D. Atanasov kaj Ivan Sarafov, sekretario de BEA. Specialajn horojn por studado de E-kantoj havis k-do Jordan Markov. Generala metodika gvidanto de la kurso estis k-do Kunco Vâlev, lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato.

La 20-an de aprilo 1969 okazis regiona konferenco de instruistoj-esperantistoj el la distriktoj de Ruse, Razgrad kaj Silistra. Similaj konferencoj estis organizitaj en Plovdiv, Ŝumen, Kjustendil, Smoljan, Vraca.

Kiel oni povas facile konstati, la organizitaj klopodoj de la esperantistaro, helpata de ŝtataj lernejaĵ instancoj, donas bonajn fruktojn.

Jam alvenis la sezono konvena por kursa laboro. Ni turnas denove la atenton de niaj esperantistaj societoj, distriktaĵ komitatoj, la Instruista Sekcio de BEA k. a. alpaŝi al sistema, bone pripensita kaj organizita agado por prepari en kursoj novajn taĉmentojn da esperantistoj kaj Esperanto-instruistoj. La riĉa sperto de nia Asocio povas certigi seriozajn sukcesojn, kondiĉe ke nia agado tiurilate estos bone kaj atente organizita.

Ni ne forgesu, ke proksimiĝas nia 38-a nacia Esperanto-kongreso kaj nia devo estas renkonti ĝin per novaĵ, pli multnombraj vicoj de la bulgara esperantistaro!

Al laboro, anticipe bone preparita, plene rezultodona! Tiamaniere ni efektivigos la decidojn de la kvinlanda Lerneja Kunordiga Konferenco en Maribor kaj denove pruvos, ke en nia lando la Esperanto-movado konstante prosperas.

Esperantistoj, karaj samideanoj!

Ĉu vi jam abonis nian asocian organon?

Ĉu vi abonigis viajn E-konatojn, viajn eksterlandajn amikojn?

Varbu novajn abonantojn senprokraste, energie! Via nomo devas brili sur nia Verda Tabulo!

Ĉiu poŝta filio akceptos vian abonkotizon ĝis la 10-a de decembro.



Jam aperis la senpacience oficiala organo de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI) sub la nomo „Internacia Pedagogia Revuo“ (IPR). Ĝia provnumero estas en la manoj de la esperantistoj-instruistoj. Ĝi estas belaspekta, enhavoriĉa, interesa, valora. Speciale notindaj materialoj: „Ĉu ni bezonas pedagogian revuon?“ — de Rudolf Rakuŝa, membro de la Akademio de Espe-

**INTERNACIA
PEDAGOGIA
REVUO**

Jarkolekto I

IPR



Januaro 1970

Nürnberg

N-ro 0 (Provnumero)

ranto; „La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lerneaj studobjektoj“ de d-ro Istvan Szerdahelyi (Serdahej) — fakestro de Esperanto — lingvo kaj literaturo en la scienca universitato Eötvös L., Budapeŝto; „Nova matematiko en la italaj elementaj lernejoj, pedagogiaj didaktikaj problemoj“ de Bianco Claudio (Italio); „Instruado de matematiko por ingeniierstudentoj en Italio“ de Carlo Minnaja el la Instituto de Aplika Matematiko en Padova — Italio; „La modernigo de la matematik-instruado“ de Ricsei Balacs (Hungario); „Lecionhoraro por eduki al la ekonomio“ de Catina Dazzini, instruistino en elementa lernejo (Italio) k. a.

Laŭeble ĉiu numero de la Internacia Pedagogia Revuo sekvos la jenan planon:

- a. Teoriaj artikoloj el la pedagogia scienco;
- b. Fakmetodoj kaj didaktikaj traktaĵoj;
- c. Informoj el la pedagogia vivo;
- ĉ. Opinioj — proponoj — deziroj — sciigoj.

La Revuo aperos 3-foje jare — 15-an de januaro, 15-an de majo kaj 15-an de septembro.

Maribor — 27—31 de julio 1970

La konferenco, kiun partoprenis pli ol 200 delegitoj el 17 landaj sekcioj de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (Aŭstrio, Britio, Bulgario, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Suda Koreujo, Nederlando, Svedio, Svisio, Usono) pritraktis kiel ĉefan temon la eblecojn por vastigo de la instruado de Internacia Lingvo en diversaj landoj — ĉu eksperimente, ĉu ĝenerale. La laborkampo estis tre vasta. La konferenco okupis sin pri baza dokumentaro por uzo inter la neesperantistoj kaj oficialaj instancoj en ĉiuj landoj, plie — pri la kreo de infangazetoj kaj infanliteraturo. Por doni al la infanoj eblecon renkontiĝi kaj uzi la scipovon de Internacia Lingvo, oni decidis starigi feriajn centrojn por gejunuloj inter 11—16 jaroj. En la diversaj raporto de la landaj sekcioj de ILEI montriĝis, ke Esperanto ĉiam pli kaj pli trovas grandan atenton ĉe la politikaj kaj fakaj instancoj.

La konferencon salutis la urbestro de Maribor Mirko Zlender, substrekante la gravecon de Esperanto por interkompreniĝo de la homoj en la mondo.

Oni akceptis apartajn konkludojn kaj decidojn rilate bazan dokumentaron, infangazetaron, feriajn centrojn, Internacian Pedagogian Revuon, televidan kurson de Esperanto (subteni klopodojn en Nederlando por starigo de televida kurso de Esperanto), normigo de superaj ekzamenoj por Esperanto-instruistoj, normigo de la lerneaj instruplanoj, lernolibroj k. s.

SCIENCISTOJ DISKUTAS NOMOJN POR VIVAĴOJ EL ALIAJ MONDOJ

La problemoj, kiel nomi bestojn, vegetaĵojn aŭ tute malsimilajn vivaĵojn eventuale trovatajn en ekstertera spaco aŭ sur aliaj planedoj, jam fariĝis temo de diskutoj inter estontecpensemaj sciencistoj. La ĝisnunan debaton resumas artikolo en „Taxon“, internacia revuo pri la klasifikado kaj nomado de vegetaĵoj, eldonata en Nederlando. La aŭtoro, marbiologia profesoro Ralph A. Lewin el Usono asertas, ke la uzado de la latina lingvo devigas la sciencistojn konsulti klasikistojn antaŭ ol nomi novajn trovaĵojn. La kondiĉoj de moderna spac-esplorado postulas, laŭ lia konkludo, konsento pri facila kaj klara universala lingvo por nomi eksterterajn vivaĵojn. Lewin proponas por tiu rolo Esperanton, lingvon uzatan por internaciaj komunikaĵoj ekde ĝia sinteziĝo en 1887.



55-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO *Vieno, 1-8. VIII. 1970*

Post la Interkona Vespero, okazinta la 1-an de aŭgusto en la salonoj de la kongresejo „Sofiensäle“, dimanĉon matene (la 2-an de aŭgusto) la kongresanoj — proksimume 2000 el 46 landoj — kolektiĝis en granda salono de „Stadthalle“ al la solena inaŭguro de la Kongreso.

Kiam la salonon eniris la alta protektanto de la Kongreso d-ro Franz Jonas (Franc Jonas) — la prezidanto de la Respubliko Aŭstrio, tondra longedaŭra aplaŭdo salutis lin. Grupo de infanoj-esperantistoj, partoprenantaj la 11-an Internacian Infankongreseton, bonvenigis lin kaj prezentis al li florbukedon.

D-ro Leopold Grimme, la prezidanto de LKK, salutis kaj bonvenigis la honorajn gastojn, unuavice la federacian prezidanton, la federacian ministrinon por enlandaj aferoj Otto Rösch, la ŝtatssekretariinon Gertrude Wondrack, la prezidanton de Aŭstria Sindikata Ligo Anton Benya, la anstataŭanton de la ĝeneraldirektoro de la Poŝto kaj aliajn eminentulojn.

Prof. d-ro Ivo Lapenna en la nomo de UEA kaj la tuta Kongreso bonvenigis la Prezidan-

tan Moŝton de la Respubliko Aŭstrio Franz Jonas kaj elkore salutis la reprezentantojn de diversaj ŝtatoj kaj de la urbo Vieno.

Sekvis bonvenigaj vortoj de S-ro Hubert Pfoch en la nomo de la urbestro, kiu substrekis, ke en Vieno ofte okazas grandaj kongresoj, sed nia kongreso elstaras kiel la katedralo Sankta Stefano pro la fakto, ke ĝi ne bezonas interpretistojn.

Kiam la prezidanto de UEA anoncis, ke la parolon havas la ŝtatprezidanto de Aŭstrio, sekvis longedaŭra aplaŭdo, al ni bone komprenebla, ĉar lia Prezidenta Moŝto estas bona esperantisto. Kaj vere d-ro Franz Jonas faris sian salutparoladon en modela Esperanto (ĝin ni donas aparte).

Sekvis dankaj vortoj de la prezidanto de UEA al la alta protektanto de la Kongreso kaj samideano Jonas pro la inspiraj vortoj, per kiuj li bonvolis malfermi la Kongreson. D-ro Lapenna emfazis, ke la unuan fojon en la historio de E-movado nian kongreson malfermas ŝtatestro-esperantisto.

Post adiaŭo de la ŝtatprezidanto kaj muzika punkto sekvis salutoj de reprezentantoj de registaroj.

En la nomo de la bulgara Ministerio de Eksteraj Aferoj salutis la Kongreson k-do Stefanov — konsulo ĉe la Bulgara Ambasadorejo en Vieno. Ĝojiga estis la fakto, ke inter la 16 oficialaj registaraj reprezentantoj pluraj salutis en la Internacia Lingvo.

Sekvis salutoj de reprezentantoj de aliĝintaj al UEA landaj asocioj (26), de la landaj asocioj nealiĝintaj (5), de landoj sen organizita E-movado (7) kaj telegramaj salutoj.

Post muzika punkto sekvis festparolado de prof. d-ro Ivo Lapenna, la prezidanto de UEA. La inaŭguro de la Kongreso finiĝis per „La Espero“.

Parto de la multnombra publiko ĉe la inaŭguro



BELARTAJ KONKURSOJ

La belartaj konkursoj okazis sub prezido de prof. Waringhien. Partoprenis 70 personoj. Estis proklamitaj la jenaj premioj:

Originala poezio

1. kaj 2. premioj ne aljuĝitaj.
 3. Nicolino Rossi, Italio: „Misrenkontoj“.
- Laŭda mencio: Zora Heide, Danlando: „Vi al mi, mi al vi honore“.

Tradukita poezio

1. Prof. Gaudenzio Pisoni, Italio: „Rido de la bela virino“ de Gabriello Ghiabrere.
2. Ne aljuĝita.
3. a) Gaudenzio Pisoni, Italio: „Sur monto Marjo“ de Giosuo Carducci.
- b) Masayuki Kuroda, Japanio: „Ohio“ de Mokito Saitoo.

Originala prozo

1. kaj 2. ne aljuĝitaj
3. Andreo Szabo, Hungario: „Vojkurba renkonto“

Originala dramo

Premioj ne aljuĝitaj
Laŭda mencio: Eduard V. Tvarozek, Ĉeĥoslovakio: „La pendmaŝo“.

Nova talento

Adam Hryniewicz, Argentino — pro traduko de la poemo „Se“ de Rudyard Kipling.

ORATORA KONKURSO

Ĉeestis 200 personoj. Prezentiĝis kvin parolantoj.

La unuan premion gajnis *Duncan Charters* (Usono) pri la temo „Kion volas mia generacio“.

Dua premio: *Jo Haazen* (Belgio) pri la temo „Aŭtoritatisma demokratio aŭ anarkio en la lernejoj“.

Tria premio: *s-rino J. Aberg* (Svedio) pri la temo „Ĉu la lernejo edukas la junularon por la estonteco“.

La juĝkomisiono konsistis el *H. Tonkin*, *J. Thierry* kaj *A. Pettyn*.

OFICIALA AKCEPTO FARE DE LA URBESTRO

La oficiala akcepto fare de la urbestro de Vieno okazis en la urbodomo. Partoprenis preskaŭ ĉiuj kongresanoj. Variaj manĝaĵoj, bongustaj trinkaĵoj, afablaj vortoj, muziko kaj ebleco por danci instigis la kongresanojn resti ĉi tie de la 16 ĝis la 18 horo.

Noto de Red. Informoj pri la komitat-kunsidoj kaj la ĝeneralaj kunvenoj de UEA, pri fak-kunvenoj, pri Internacia Somera Universitato kaj pri kelkaj aliaj aranĝoj dumkongresaj ni donos en № 10 de „BE“.



Prof. d-ro Ivo Lapenna faras sian festparoladon

ESPERANTO — TURISMA LINGVO

Parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto povos utiligi tiun komunikilon ĉe pli ol 60 kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj grupaj ferioj tra la mondo ĝis la fino de 1970. Entute 27 el la renkontiĝoj estis planitaj por la monato julio; ili etendiĝas de San Francisko ĝis Osako kaj inkluzivas ĉion ekde Beethoven ĝis junulara labortendaro por volontuloj.

Multe pli ol oni atendus laŭ ilia proporcio en la loĝantaro, la uzantoj de Esperanto reprezentigas abunde ĉe internaciaj okazigaĵoj. Sekve, la Internacia Lingvo, kiu antaŭ 80 jaroj estis nur ĵus-ellaborita plano de pola okul-kuracisto, nun ĉiam pli ofte troviĝas inter la lingvoj de internaciaj kunvenoj kaj turismaj eldonaĵoj.

Ĉiujare pluraj landoj konkurencas por gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto — kaj ne surprize. Ĉiu tia kongreso altiras inter 2000 kaj 4000 partoprenantojn por unu semajno, kaj — malsimile al multaj fakkongresoj — la lokaj instancoj scias, ke unu el la ĉefaj celoj de la kongresanoj estas persone ekkoni la gastigantan landon kaj ĝian popolon.

ĈIUMONATAJ LETERVESPEROJ

Ĉiumonate aranĝas letervesperojn la Vroclava Esperanto Klubo (500 membroj en aĝo 16—70). Skribu amase al: Vroclava Esperanto-Klubo, Vroclav-17, poŝtkesto 16, Pollando.

SALUTPAROLADO DE D-RO FRANZ JONAS

Ŝtatprezidanto de Aŭstrio kaj alta protektanto de la 55-a UK de Esperanto

Tre ŝatata prezidantaro, tre ŝatataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

La kvindekkvina Universala Kongreso de Esperanto unuigas en Vieno dumil adeptojn de la Internacia Lingvo Esperanto. Tio estas bonvena okazo por la federacia prezidanto de la Respubliko Aŭstrio saluti la kongresanojn nome de la aŭstria popolo kaj ankaŭ saluti ilin kiel samideano.

Vi estas gastoj en lando, kiu ĉiam estis favora al Esperanto kaj instigis la Movadon en kelkaj direktoj. En la jaro 1904 jam okazis en Graz la unua aŭstria Esperanto-kongreso; do, unu jaro antaŭ la unua Universala Kongreso

de Esperanto en Bolonjo ĉe Maro, en kiu Zamehof faris sian faman inaŭguran paroladon. Intertempe en nia lando jam okazis du kongresoj de la Universala Esperanto-Asocio, tio estas en la jaroj 1924 kaj 1936, kaj tri kongresoj de la Sennacieca Asocio Tutmonda, tio estas en 1925, 1955 kaj 1962.

Ekde la komenco la Movado en Aŭstrio sukcese evoluigis, sed bedaŭrinde interrompita dum la du mondmilitoj kaj malpermesata dum la aŭtokrataj reĝimoj. Tiel la Esperanto-movado travivis la saman sorton kiel multaj aliaj kulturmovadoj. Hodiaŭ denove ekzistas vigla Esperanto-movado kun diversaj branĉoj. Apud la Aŭstria Esperantista Federacio agas specialaj unuiĝoj de socialistoj kaj katolikoj, de fervoristoj kaj naturamikoj. Depost 1925 en Aŭstrio ekzistas ŝtata Ekzamen-Komisiono kaj en la jaro 1929 estigis en



Vieno la fama Internacia Esperanto Muzeo. Post la lasta milito fondiĝis la Aŭstria Esperanto-Instituto kaj krome Asocio por Internacia Interkompreniĝo. Ekzistas ankaŭ pluraj gazetoj regule aperantaj.

Povas do esti, ke eksterlandaj samideanoj gratulus la aŭstriajn esperantistojn pro la bona stato de la Movado. Sed mi diros al vi, ke la aŭstria esperantistoj mem ne estas kontentaj. Ili sentas la samajn malfacilaĵojn kiel la samideanoj en aliaj landoj. Kvankam la internacia vivo fariĝas ĉiam pli intensa, la oficiala mondo daŭrigas la malnovajn kaj maltaŭgajn metodojn de lingva interkompreniĝo. Estas vero, ke la moderna tekniko helpas faciligi la taskon de la profesiaj tradukistoj dum kongresoj, sed ne pli. Iliaj teknikaj aparatoj estas maltaŭgaj ludiloj kompare kun la mondvasta farenda tasko, nome superi la lingvajn barojn inter la popoloj, inter milionoj da homoj. Tial la esperantistoj nuntempaj devas pensi kiel realistoj, ili devas varbi pli kaj per novaj rimedoj. Ili turnu sin ĉefe al la junularo, al ĉiuj interesuloj, ankaŭ al ĉiuj, kiuj estas respondecaj por la bonstato de la popoloj kaj ŝtatoj. Sed ĉar mi en tiu rilato mem havis multe da spertoj, mi avertas vin: ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la



Esperanto-movado estas forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon.

La problemo de internacia help-lingvo jam delonge ne plu estas nura teorio. Esperanto solvis tiun ĉi problemon, ĝi realigis la teorion kaj transigis ĝin al praktiko. Dum jardekoj en multaj landoj ne nur estas tradukitaj juvelaj verkoj el naciaj literaturoj, sed aperas ankaŭ multege da verkoj originale en Esperanto. En multaj landoj aperas Esperanto-gazetoj, kiuj ne nur perfektigas la adeptojn en lingva rilato, sed ankaŭ disvastigas valoran scion trans la etnikajn limojn, de kontinento al kontinento, tra la tuta mondo.

Esperanto ĝis nun sukcese trapasis ĉiujn ekzamenojn, al kiuj ĝi estis submetata flanke de scienco kaj tekniko, de politiko kaj komerco, de pedagogio kaj literaturo. Kian pruvon do pri la taŭgeco de Esperanto la dubantoj krome bezonas? Nur la propran sperton, propran sperton anstataŭ malsaĝa antaŭjuĝo!

Karaj gesinjoroj, la esperantistoj dum la pasintaj jardekoj konsekvence varbis por la ideo de interkompreniĝo per la Internacia Lingvo. Ili estis la profetoj de la Movado. La nuna generacio de esperantistoj jam estas la pioniroj de Esperanto en praktika vivo. Sed ili reniam forgesu, ke Esperanto ne nur estas rimedo por la ĉiutaga praktika vivo, sed ke ĝi estas eterne ligata al grandaj kaj altaj idealoj: al solidareco de la popoloj, al progreso de la homaro, al paco de la mondo!

Tiamaniere portante pluen la spiriton de humanismo, kiu ardigis ĝis nun tiom da esperantistoj, ni inaŭguru la kvindekkvinan Universalan Kongreson de Esperanto. Mi deziras al ĝi plenan sukceson kaj al la kongresanoj — neforge-seblajn travivaĵojn en Aŭstrio.

LA DUA KOMUNO EN LA MONDO

En junio ĉi-jare en urbo Samokov estis celebrata la 60-a datreveno de la fondiĝo de la punua en nia lando kaj en la Balkana Duoninsulo kaj dua en la mondo komunista komuno. La 13-an de junio 1910 j. la demokratiaj civitanoj de Samokov, gvidataj de la Laborista Socialdemokratia Partio (t. n. mallarĝaj socialistoj) venkis per regulaj balotoj la reakciajn fortojn kaj super la komunumo de la urbo ekflirtis ruĝa standardo. La burĝa potenco kruele venĝis; la gvidantoj de la komuno Asen Ĥaĝivasilev, Boris Ĥaĝisotirov, Georgi Zujbarov, Dimitr Nikov, Kosta Kibarov kaj Ĥristo Dibekov estis mortigitaj, la komuno mem — detruita.

La 9-an de septembro 1944 j. la ruĝa standardo denove — kaj por eterne — ekflirtis su-



Florin al la prezidanto Jonas prezentas partoprenantojn en la Infana Kongreseto

per la komunumo de Samokov. Komenciĝis nova vivo. La nepoj de la gloraj samokovaj socialistoj dum nelonga tempo fundamente ŝanĝis sian loĝlokon: el malriĉa urbo de etaj metiistoj kaj agrikulturistoj Samokov transformiĝis en industria kaj kultura urbo. Sur la lokoj de la malgrandaj metiistaj laborejoj kaj kapitalistaj entreprenoj altiĝis 20 grandaj modernaj ŝtataj kaj kooperativaj entreprenoj. La urbo fieras per siaj novaj loĝdomoj, multaj lernejoj, infanĝardenoj, kulturdomo, universala magazeno, kinejo k. a. Ni marŝas senŝancele al ĉiam pli riĉa, pli feliĉa kaj kultura vivo.

Ĥristina Veceva

sekretario de E-societo „Rila Esperantisto“ —
Samokov

MIA AMIKO JEAN MONNIER

Originala rakonto de *Ivan Draganov*

Iun tagon, ripozante en mia hejmo, mi aŭdis, ke iu sonorigas. Malferminte la pordon, mi estis agrable surprizita: ĉe la sojlo staris mia amiko el infanĝo Stefĉjo. Jam multajn jarojn ni ne renkontiĝis. Mi tuj invitis lin eniri la ĉambron. Ho, kion faras la tempo! Ĝia ĉizilo tiel profunde estis faltinta la frunton de Stefĉjo, la jaroj tiel malavare surŝutis per arĝento lian hararon!

Dum nia konversacio Stefĉjo rakontis al mi pri sia vivo, pri siaj ĝojoj kaj malĝojoj, pri siaj travivaĵoj. Post nia longa disiĝo ni ja havis riĉan vivosperton, multajn amasigitajn impresojn, pri kiuj ni ambaŭ tiel arde deziris paroli!

Subite Stefĉjo eksilentis. Mi rimarkis, ke liaj okuloj estas fiksitaj al iu punkto de mia skribotablo. Li observis kun granda atento la florvazon, ornamitan per forĝita feraĵo — ellaboraĵo de majstro-juvelisto. Sur unu flanko de la vazo estis algluita malgranda kadro, el kiu rigardis nin portreto de viro. Sur la alia flanko de la vazo estis alforĝita submetaĵo, belarte ellaborita, sur kiu estis bone alkroĉita poŝhorloĝo. Unu el ĝiaj fermokovriloj estis disrompita kaj meze de la risorto montriĝis peco de fero. Stefĉjo ekrigardis min scivole, kaj mi tuj komprenis: li deziras scii la historion de la poŝhorloĝo. Kaj mi kontentigis lian sciivoleon.

— Tio estas karega por mi kaj samtempe tragika historio — tiel mi komencis mian rakonton. — Vi rememoras, ke antaŭ la Unua Mondmilito mi hazarde trovis malgrandan libron — ĝi estis lernolibro de la Internacia Lingvo Esperanto. Komence pro sciivolemo kaj poste tre serioze mi estis

tiel profunde absorbita de la lernado, ke nur post kelkaj monatoj mi jam povis legi, skribi kaj eĉ traduki en Esperanton.

Foje, vizitinte la proksiman urbon, mi kontaktiĝis kun malnova kaj jam maljuna esperantisto. Li faris al mi komplimenton pro mia progreso kaj fervoro kaj inspiris al mi grandan kuraĝon. Fine li montris al mi kelkajn adresojn de fremdlandaj esperantistoj. El ili mi elektis la adreson de Jean Monnier (Ĵan Monié) el Francio, ankaŭ instruisto kiel mi. Tiamaniere komenciĝis longa kaj sincera korespondado. Ni interŝanĝis leterojn, ilustritajn poŝtkartojn, librojn, albumojn kaj diversajn etajn donacojn.

En unu el siaj leteroj mia amiko Jean Monnier sciigis min, ke li intencas entrepreni dum la somera ferio internacian ekskurson. Versajne li venus por gastigi ĉe mi, en Bulgario. Tio tre ĝojigis min. Mi tuj respondis, ke mi jam atendas lin. Iun tagon mi ricevis telegramon el Sofio, per kiu li sciigis, ke la sekvan tagon li vizitos min. Ĝis tiam ni persone ne renkontiĝis. Nia kontakto estis nur perletera kaj ni konis unu la alian nur laŭ interŝanĝitaj portretoj. Malgraŭ tio en la momento, kiam la vagonaro haltis ĉe la kajo de la stacio, ĉe unu el la fenestroj de la unua vagono mi tuj rekonis mian amikon.

Sekvis longaj kaj amikaj konversacioj. Ni fariĝis ankoraŭ pli intimaj kaj sinceraj amikoj, eĉ ion pli — ni jam sentis nin kiel fratoj. Dum tiu tempo Jean Monnier donacis al mi poŝhorloĝon kun du fermokovriloj. Sur la interna flanko de la unua estis skribite: „Al mia amiko, por rememoro. — Jean Monnier, el Francio, 1913 jaro“, kaj sur la alia — mia nomo. Tium poŝhorloĝon mi ĉiam portis kun mi.

Nerimarkite por ni ambaŭ forpasis tuta monato depost lia alveno. Fine venis la tago de nia disiĝo. Mi akompanis lin adiaŭe ĝis Sofio.



En la sekvinta jaro eksplodis la Unua Mondmilito. Bulgario eniris ĝin en oktobro 1915. Mi estis mobilizita kiel oficiro el la rezerva armeo. Tre rapide mi troviĝis sur la batalkampo — la tiel nomata „Suda Fronto“. Ĉu estas necese priskribi al vi la teruraĵojn de la milito? Ĉirkaŭ mi regis plena infero — fajfis kugloj, eksplodis bomboj, obusoj, ĉiuloke estis vundataj kaj mortigataj homoj, kaj preskaŭ ĉiuj estis junaj!

Multaj el miaj soldatoj estis jam vunditaj. Iun tagon, dum terura batalo, proksime de mi eksplodis obuso. Nur tio restis en mia memoro, ĉar tuj poste mi perdis la konscion. Malferminte okulojn, mi vidis, ke super mi estas kliniĝinta nekonata kuracisto. Do, mi estis en lazareto. De la kuracisto mi eksciis, ke mia vundo ne estas grava. Li klarigis al mi, ke pro stranga hazardo, kiu similas al miraklo, mi restis viva dank' al mia poŝhorloĝo. Jes, nur dank' al mia horloĝo, donacita al mi de mia amiko el Francio — Jean Monnier. Kiel mi jam diris al vi, tiun horloĝon mi ĉiam portis kun mi, en la maldekstra poŝo de mia oficira jako, ĝuste super mia koro. Peceto de la obuso rompis la supran fermokovrilon de la horloĝo kaj trafis la mezon de la risorto, kiu, kune kun la alia fermokovrilo, malintensigis la forton de la frapo kaj haltigis la obuspecon tie. Se tio ne estus okazinta, la peco de

la obuso certe trafus ĝuste mian koron kaj la morto estus neevitebla. . .

— Kaj kio okazis al via amiko Jean? Ĉu vi sukcesis ekscii ion pri li? — demandis min Stefĉjo.

— Post la fino de la milito lia patrino sciigis min per letero, ke ŝia amata filo kaj mia kara amiko Jean pereis sur la batalkampo dum la milito. Kaj li estis apenaŭ 25-jara! Sed interesa koincido: li falis morta en la sama tago, kiam lia poŝhorloĝo, donacita al mi, savis min!

Mia amiko Stefĉjo denove ĵetis rigardon al la horloĝo, poste direktis ĝin al la kadro kun la portreto. La tuta kadro estis inkrustita majstre kiel punto per mirindaj ornamaĵoj. En la bazo de la kadro la juvelisto, laŭ mia peto, estis plektinta en la punto per arĝentaj fadenoj la nomon de mia neforgesebla kaj karega amiko Jean Monnier. El la portreto rigardis nin du viglaj okuloj, ankaŭ la vizaĝo ridetis kvazaŭ viva. El la florvazo kelkaj galantoj — la unuaj floroj de la jam veninta printempo — milde alrigardis la portreton de Jean. Mi neniam forgesis meti florojn en la florvazon. Ĝi kaj la poŝhorloĝo ĉiam rememorigos al mi pri mia amiko Jean Monnier, al kiu mi ŝuldas eternan dankon pro la savo de mia vivo. Kaj la floroj staras tie, kiel simbola donaco sur lia nekonata tombo. . .

PROMETEO

de Roman Kudlik

Mi ne scias,
ĉu li vere ekzistis. . .
Sed estas
ĉe ukrainoj Taras,
ĉe poloj — Mickeviĉ,
ĉe kubanoj — Hose.
Kaj oni nomas ilin —
Prometeoj. . .

Kaj via patrino

blankigis dometon,
sub la portretoj
de Lenin kaj Ŝevĉenko
florojn
ŝi starigas en akvon. . .

Ĉiu popolo
havas sian Prometeon,
kaj Lenin estas
Prometeo de ĉiuj popoloj!

Elukrainigis: *Nadja Andrianova*



LA KASKADO DE LA REĜINO

de László Benjámín¹

I

Reĝin' Maria, la anglino,
edzin' de reĝo Ferdinando
al si kastelon konstruigis
en Dobruĝa, kiu brakumas
per sia ĉirkaŭpren' la maron,
per unu brako Nigran Maron.
Reĝin' Maria, la anglino,
en jar' mil naŭcent dudek kvara
al si kastelon konstruigis.

II

En jar' mil naŭcent dudek kvara
per unu brak' amanton turkan
kaj ankaŭ morton ĉirkaŭbrake,
senpace reĝedzin' Maria
al si kastelon konstruigis
kun minareto ĉielpika,
kun vazoj, kun skulptitaj ŝtonoj,
kun eolharpoj — maltrankvilaj
bruadoj de fantomaj vagoj.
En seĝ' marmora side vidis
vizaĝon sian en la maro
la vanta reĝedzin' Maria.

III

La mar' ĉe viaj piedoj kuŝas,
majesta reĝedzin' maria!
Maldungu for la masonistojn,
l' amanton turkan ĉirkaŭprenu
kaj por minuto ankaŭ morton
forĝesu, reĝedzin' Maria.
Nun pagu al la masonistoj,
l' amanton turkan ĉirkaŭprenu,
la masonistojn lasu iri
al la edzinoj, al la hejmoj.
La Nigra Maro — ĉe l' piedoj,
belega reĝedzin' Maria,
sed kial tiu ĉi kaskado?

IV

Maria, reĝedzino bona!
La larmoj salas, kaj la maro. . .
Kaj nia ŝvito sale lavas
vizaĝon, manojn salo tanas. . .
Per man' miraklofara benu,
Maria, viajn balĉikanojn,²
amata reĝedzin' Maria!
Ne prenu l' akvon de la fontoj
kaj putojn niajn ne sekigu.
La langoj de l' infanoj ŝvelas,
la sang' en vejnoj koagulas,
rabias hundoj kaj azenoj,

¹ La hungara registaro distingis la poeton du fojojn per Kossuth-premio (Koŝut-premio) pro lia poeta verkaro. Tiu ĉi poemo gardas la memoron pri lia restado en Bulgario.

² Balĉikanoj — loĝantoj de urbo Balĉik, kiu situas apud la parko de reĝino Maria sur la marbordo.

ni mortas, reĝedzin' Maria,
mortigas nin kaskado via. . .
La akvon de la balĉikanoj,
je dio, reĝedzino bona,
ne verŝu en la Nigran Maron!

V

Bruadas la kaskad' reĝina.
Bruadas la popol' balĉika.
Reĝin' Maria malbenita!
Vin kaptu niaj fiŝoretoj
el la profundo de la maro!
La hok' okulon vian trafu!
Al vi sin puŝu la remiloj!
Sin kroĉu konko kaj omaro
je l'kavoj de l'okuloj viaj,
reĝin' Maria, malbenita,
ĉar vi trinkakvon nian salis,
ĉar nian vivon vi mortigis —
sur via kap' malben' seplingva
de l' soifantaj balĉikanoj,
reĝin' senkora kaj fiaĉa!

VI

Bruadas la kaskad' reĝina,
indifirentaj mevoj flugas,
la spiro flugas, nubo flugas,
juneco de l' reĝino flugas.
La Nigra Maro malafable
ondkrestojn nigrajn siajn skuas,
armiloj bruas en la maro,
ĉebordaj rokoj rebruadas,
armeoj grandaj kiel ondoj
ĵetiĝas tondre al la rokoj.
De orient' al okcidento
soldatoj sturmas Nigran Maron,
sur montoj paŝas. . . Mar' bruegas.

VII

Bruadas la kaskad' reĝina,
bruadas la popol' balĉika.
Kaj de l' purpura oriento
inter soldatoj, kun la glavo
de Sankta Georgo en la mano
kaj en alia mano sia
kun la libera Bulgario —
jen Georgi Dimitrov alvenas.
Mildiĝas la soif' mortiga
de malriĉuloj la balĉikaj.

El la hungara:

Sandor Termes (Ŝandor Termeŝ)

PROF. D-RO POŜKA VERKAS E-LIBRON

La litova Esperanto-pioniro prof. A. Poŝka verkas en Esperanto 300-paĝan libron „Ni ĉiuj estas fratoj“ — pri sia tutmonda vojaĝado pere de Esperanto kaj la delegita reto de UEA. En ruslingva traduko de prof. D. Armand ĝi aperos en 1971 ĉe moskva eldonejo „Misl“.





ESPERANTO EN LA MALLIBEREJO

de *Velko Rusinov*

Ofte kiam ni, malnovaj amikoj-esperantistoj, kunvenas, ni komencas rakonti unu al la alia, de kiam kaj ĉe kiaj cirkonstancoj ni lernis la Internacian Lingvon Esperanto. Simila okazo instigis min rakonti al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ miajn rememorojn.

La rememoroj revenigas min al antaŭ multe da jaroj. En 1924 mi finis realan gimnazion en urbo Ferdinand (nun Mihajlovgrad). Aŭtune de la sama jaro mi komencis studi en la Pedagogia Instituto en urbo Berkovica, kie oni pretigis unuagradajn instruistojn. La studentoj de la Instituto estis en sia plejmulto gefiloj de laboruloj kaj ili ĝuis la renomon de progresemaĵoj. Sian progresemon ili manifestis diversmaniere kaj per tio maltrankviligis parton de la instruistoj. Post la frakaso de la kontraŭfaŝisma ribelo en 1923, kies centro estis urbo Ferdinand, la monarkofaŝista registaro likvidis la progresemaĵajn organizaĵojn. En nia Instituto komenciĝis neleĝa agado. Ni interŝanĝis progreseman literaturon, disvastigis kontraŭfaŝistajn flugfoliojn, organizis marksismajn rondojn. Ĉe tia atmosfero de revolucia bolado mi la unuan fojon aŭdis la vorton Esperanto. Oni diris, ke Esperanto estas internacia lingvo kun simpla gramatiko, tre facile lernebla, kaj ke ĝia posedo ebligas rilatojn kun homoj el ĉiuj landoj de la terglobo. Baldaŭ Esperanto populariĝis inter ni. Estis organizita Esperanto-rondo, gvidata de lernanto.

En la printempo de 1925 la monarkofaŝista diktaturo entreprenis kruegan ofensivon por sufoki la kontraŭfaŝistan movadon en Bulgario. En ĉiuj regionoj de la lando oni amase arestis kaj mortigis kontraŭfaŝistojn. La mano de la monarkofaŝista diktaturo ne indulgis ankaŭ nin, lernantojn. Oni arestis multajn el nia Instituto, inter kiuj ankaŭ min. Post la fino de la juĝesploro, kiu okazis en la policejo de Berkovica, al ni estis permesite „promeni“ dum kelkaj minutoj sur la korto je malgrandaj grupoj. Foje promenante mi konatiĝis kun junulo ne pli aĝa ol 16 jaroj, arestito kiel ni. Li aspektis tre turmentita, apenaŭ povis moviĝi. En la mallonga interparolo mi eksciis, ke li scipovas Esperanton. La junulo ankaŭ recitis versaĵojn en Esperanto. Tiam mi la unuan fojon aŭdis, kiel sonas la Esperantaj vortoj. Tiu ĉi junulo estis la unua, kiu vekis ĉe mi efektivan intereson pri Esperanto.

De junio oni starigis nin antaŭ la tribunalon—19 akuzatojn, ĉiuj lernantoj. Oni juĝis nin pro nia aparteno al neleĝa komunista organizaĵo. Ni ĉiuj estis kondamnitaj, escepte de unu lernanto. Tri, inter kiuj ankaŭ mi, oni kondamnis al morto. La ceteraj punoj variis inter 8 ĝis 15 jaroj da severa malliberigo. Post la proklamo de la verdiktoj oni translokigis nin en la malliberejon de urbo Vraca. Nin, la mortkondamnitajn, oni izolis disde la ceteraj, metante nin en la policejon. En la ĉelo, kien oni enpuŝis nin, estis kelkaj plenaĝaj kamaradoj, tiel same mortkondamnitaj. La ĉelo troviĝis en la partero kaj havis nur unu fenestron kun fera krado, kiu rigardis rekte al la korto.

Izolitaj de la ceteraj malliberuloj kaj ĉe speciala reĝimo, ni atendis la plenumon de la mortkondamnoj. Malofte oni permesis al ni intervidiĝi kun niaj proksimuloj, kaj la intervidiĝoj okazis trans la fera krado, en ĉeesto de provoso. Foje dum intervidiĝo iu lernan-

tino de nia kamarado sukcesis kaŝe traŝovi al ni tra la krado libreton, kiun ni rapide prenis, antaŭ ol la provoso povis tion rimarki. Post la fino de la intervidiĝo, kiam la gardisto jam estis for, ni eligis la libreton. Leginte ĝian titolon — „Konciza lernolibro de Esperanto“, mi ekĝojegis. Mi, kiu estis la plej juna inter la ceteraj mortkondamnitaj, tuj komencis lerni la lingvon. La noktoj estis maltrankvilaj, ĉar tiam oni ordinarie plenumis la mortkondamnojn. La tagojn ni pasigis relative pli trankvile. Tage mi lernis Esperanton, kaŝante min de la mallibereja provoso, kiu de tempo al tempo ekrigardis tra la krado. Dum malpli ol du monatoj mi jam lernis ĉiujn regulojn kaj vortojn, kiujn la libreto enhavis.

En tiu periodo en Bulgario troviĝis centoj da kontraŭfaŝistoj, mortkondamnitaj same kiel ni, pro politika agado. En fremdlando, kiel ankaŭ en Bulgario, oni entreprenis grandan kampanjon por nuligi la mortverdiktojn. Dank' al ĉi kampanjo la monarkofaŝista registaro ĉesigis la plenumadon de la mortpunoj kaj poste anstataŭigis la neplenumitajn mortverdiktojn per dumviva mallibereco. Inter la unuaj mortverdiktoj en nia lando, kiuj estis anstataŭigitaj per dumviva malliberigo, estis la niaj. Post tio oni translokigis nin al la ceteraj politikaj malliberuloj. Tiutempe en la malliberejo de Vraca troviĝis pli ol 300 politikaj malliberuloj, apartenantaj al ĉiuj socitavoloj: laboristoj, precipe multaj vilaĝanoj, ŝtataj oficistoj, studentoj kaj lernantoj. Inter ili estis ankaŭ kamaradoj, kiuj parolis aŭ studis Esperanton. Ekestis ebleco praktiki la lingvon. Promenante en la korto, ni, la esperantistoj, interparolis en Esperanto. Baldaŭ ni parolis relative bone. Mi tralegis kelkajn Esperantajn librojn, inter kiuj — mi bone memoras tion — ankaŭ la novelon „La familio Gerak“ de la bulgara verkisto Elin Pelin.

En oktobro 1926 mi kune kun kel-

kaj politikaj malliberuloj, plejparte junuloj, estis transportitaj en urbon Vidin. Tie ankaŭ troviĝis politikaj malliberuloj. Du el ili estis esperantistoj. Ni sukcesis ligiĝi kun gejunuloj-esperantistoj el la urbo kaj — kiam tio estis ebla — ni korespondis kun ili en Esperanto. Ni organizis Esperanto-kurson ankaŭ por la kriminalaj malliberuloj.

En februaro 1930 oni translokigis min en urbon Ŝumen, ĉi-foje pro malobeo al la disciplino. Inter la politikaj malliberuloj ĉi tie mi trovis esperantiston, kiu devenis de mia naskiĝloko. Li regis la lingvon perfekte. Per nia helpo kelkaj kriminalaj malliberuloj tre bone ellernis Esperanton.

En decembro 1931 ĉiujn politikajn malliberulojn oni translokigis en la malliberejon de urbo Varna, kien estis koncentritaj ĉiuj politikaj malliberuloj el Norda Bulgario. Tie kolektiĝis sufiĉe multaj esperantistoj. Impresis la fakto, ke preskaŭ ĉiuj politikaj malliberuloj el la distrikto de Varna lernis Esperanton, kaj multaj el ili bone scipovis ĝin. Ni, politikaj malliberuloj-esperantistoj, konatiĝis kun laboristoj-esperantistoj el Varna. Ili havigis al ni Esperantan literaturon. Ligon ni havis ankaŭ kun alilandaj esperantistoj kaj interŝanĝis kelkajn leterojn kun politikaj arestitoj el la malliberejo „Edi Kule“ en urbo Tesaloniko. De ili ni ricevis en Esperanta traduko la tezojn de iu el la plenkunsidoj de CK de la Greka Komunista Partio. Dank' al tio ni eksciis multon pri la stato kaj pri la bataloj de la grekaj laboruloj. Ni korespondis ankaŭ kun laboristoj esperantistoj el Londono. Mi rememoras, ke la anglaj kamaradoj tradukis en anglan lingvon nian leteron, en kiu ni priskribis nian staton en la malliberejo. La letero aperis en iu angla gazeto, ekzempleron de kiu oni sendis al ni. Neniu el la direkcio de la malliberejo konis la anglan lingvon. La direktoro supozis, ke la gazeton sendis al ni iu



religia organizaĵo, kaj ke ĝi estas religitendenca, tial oni ordonis transdoni ĝin al ni. Inter ni troviĝis kamaradoj, kiuj scipovis anglalingve, kaj ni refoje legis ĝin.

Ni korespondis samtempe kun nederlandaj esperantistoj. Kompreneble, niaj Esperantaj korespondaĵoj ne estis cenzuritaj — ili estis ekspeditaj kaj ricevitaj laŭ sekreta vojo.

Sed inter ni troviĝis ankaŭ kamaradoj, kiuj negative rilatis al Esperanto. Ili konsideris ĝin kiel artefaritan lingvon, kiu ne kapablas esprimi la riĉecon kaj la grandan variecon de la homaj pensoj kaj sentoj. Kun tiuj kamaradoj ni, la esperantistoj, konstante disputis. Notinda estas la jena fakto. Iu el niaj aŭtoritataj kamaradoj tiel same estis kontraŭulo de Esperanto. Kun li la disputo estis tre malfacila. Foje mi riproĉis lin, ke li malakceptas aferon, kiun li ne konas, ĉar ĝis nun li neniam studis Esperanton. Do, estus pli bone, se li unue lernus Esperanton, kio ne tro multe embarasus lin, kaj jam poste ni daŭrigu la disputadon. La saman tagon tiu ĉi kamarado petis

de mi Esperantan lernolibron kaj baldaŭ li tre bone ellernis Esperanton. Samtempe li ŝanĝis sian opinion pri la lingvo, fariĝis ĝia adepto.

En la komenco de 1937 ĉiuj politikaj malliberuloj el Varna estis transportitaj en urbon Sliven. Ankaŭ tie mi pasigis tri jarojn. En februaro 1940, post 15-jara seninterrompa restado en diversaj monarkofaŝistaj malliberejoj, mi fine estis liberigita. Baldaŭ post mia liberigo, pro danĝero esti denove arestita, mi komencis vivi nelege. Tio daŭris ĝis la 9. IX. 1944, kiam nia lando, per la helpo de la Soveta Armeo, liberiĝis el la faŝismo, kaj la ŝtata povo transiris en la manojn de la Patrolanda Fronto. Kiel nelegulo kaj partizano mi ne havis eblon subteni ligan kun esperantistoj, tamen de tempo al tempo mi legis esperantaĵojn kaj ĉiam interesiĝis pri la lingvo Esperanto kaj la Esperanto-movado.

Nun mi estas organizita esperantisto, senpere ligita kun la esperantistoj el urbo Sofio. Ĉi tie mi laboras por la disvastigo de nia kara lingvo Esperanto.

E-KURSO POR INSTRUISTOJ EN ĤASKOVO

Laŭ iniciato de la Distrikta Komitato de BEA en urbo Ĥaskovo, la fako „Popola Instruado“ ĉe Distrikta Popola Skolo organizis 20-tagan E-kurson por instruistoj. Reĝe al la leteroj, kiujn la Fakto dissendis, al la kurso aliĝis 20 ĝeinstruistoj el la distrikto. Ĝi daŭris de la 29 de junio ĝis la 18 de julio. La lernotempo en la kurso estis rekonita kiel ofica. Kursgvidanto — Mihail Elenov.

Pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj pri la neceso studi ĝin en la lernejoj ĉe la malfermo de la kurso parolis la prezidanto de DK de BEA Georgi Idakiev kaj en la nomo de Fakto „Popola Instruado“ — k-do Boĉo Terziev.

La kurso estis bone aranĝita kaj pasis sukcese. La partoprenantoj estas dankaj al la

DK de BEA kaj al la fako „Popola Instruado“ pro ĝia morala kaj materiala helpo.

Teksto kaj foto: Ĵeko Zaprjanov



La gekursanoj frunte kun sia kursgvidanto k-do Elenov (kun la bukado)



BRILA SUKCESO DE LA SPECIALIGITAJ PORINSTRUISTAJ E-KURSOJ

Unu el la plej gravaj kaj aktualaj taskoj de la Esperanto-movado — enlanda kaj eksterlanda — estas: altiri la instruistaron al la Internacia Lingvo Esperanto, fari ĝin neŝancelbla fortikaĵo de niaj noblaj E-ideoj kaj solida bazo por novaj, ĉiam pli kaj pli grandaj sukcesoj de la E-movado. La bezonoj pri bonaj E-instruistoj kaj kursgvidantoj estis kaj estas ĉiam akre sentataj en ĉiu lando. Kaj kiu estas la plej natura kaj neelĉerpebla fonto de novaj E-instruistoj, se ne la miloj kaj miloj da profesiaj instruistoj? Ja ili estas ĉiufanke la plej bone preparitaj personoj por instrui. Instruitio estas ilia ĉiutaga laboro, ilia esenco, ilia „sorto“. Se tiel, ni devas turni plej grandan atenton al la instruistaro, mobilizi ĉiujn niajn fortojn kaj rimedojn por konkeri ĝin, por venigi ĝin al ni, por forĝi el ĝi plej ardajn adeptojn de la Internacia Lingvo Esperanto, ĝiajn senlacajn propagandantojn kaj disvastigantojn.

Komprenante tute klare la ekskluzivan gravecon kaj aktualecon de tiu ĉi problemo, la Instruista Sekcio kaj la Sofia Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio starigis antaŭ si la taskon labori sisteme kaj laŭplane inter la bulgara instruistaro. Unu el iliaj plej gravaj iniciatoj tiurilate estas la specialigitaj porinstruistaj E-kursoj.

Pasintjare tiaj kursoj estis organizitaj en distrikta skalo kaj dum tiu ĉi jaro — en tutlanda skalo. La iniciato krei nacian centron por preparo de Esperanto-instruistoj el inter profesiaj instruistoj estis plene aprobita kaj morale subtenita de la Estraro de CK de BEA.

En la ĉi-jara foresta kurso partoprenis 240 instruistoj, edukistoj, lernejspektoroj kaj direktoroj, el kiuj estis formitaj 8 grupoj por

komencantoj: Sofio — 2, Plovdiv — 1, Jambol — 1, Ŝumen — 1, Veliko Târnovo — 1, Samokov — 1, Zlatica — 1, kaj 2 grupoj por progresintoj: Sofio — 1 kaj Ŝumen — 1.

Gvidantoj de la grupoj estis Kunĉo Vălev, Ivan Caney, Penĉo Petrov, Stojan Popov, Canko Murgin, Ĥristo Dolĉinkov kaj Simeon Ĥesapĉiev. Tutan monaton la kursanoj lernis foreste en siaj hejmoj laŭ speciala lernolibro kaj post ĉiuj du lecionoj preparis kontrolekzercon. Fine de la monato ili kolektiĝadis por grupa ĉeesta leciono sub la gvido de sia kursestro.

Ĉi tiu studsistemo montriĝis tre bona kaj celkonforma, ĉar ĝi donas eblecon al ĉiu instruisto partopreni la kursojn. Ja konata estas la fakto, ke la instruistoj, unue, estas tro disigitaj en diversaj loĝlokoj kaj, due, ke ili estas ege okupataj dum la lernosemajno.

Por helpi la pluan perfektigadon de la forestaj kursanoj, en la somera ferio por ili funkcias speciala ĉeesta 20-taga kurso. Kompreneble, tiun ĉi kurson povas partopreni ankaŭ aliaj instruistoj, kiuj nun deziras eklerni la lingvon aŭ jam lernis ĝin ekster la foresta sistemo.

Bonege pasis la somera ĉeesta kurso ĉi-jare. En Godeĉ, kie ĝi okazis, kolektiĝis 126 ĝeinstruistoj el la tuta lando, kiuj studis la lingvon en 6 grupoj: 1 — por komencantoj, 4 — por progresintoj kaj 1 — por kandidatinstruistoj (metodika).

La instruprogramoj por ĉiu lernogrado estis anticipe ellaboritaj kaj aprobitaj de la metodika konsilantaro de la kursoj.

En la komencanta grupo, gvidita de k-ino Maria Angelova, oni studis la gramatikon kaj ekregis modestan vortaron.

En la 4 progresintaj grupoj, gviditaj de k-doj Kunĉo Vălev, Canko Murgin (poste Petko Arnaudov), Jordan Angelov kaj Dimitr Caney, la akcento falis sur la pliriĉigon de la leksiko kaj la evoluigon de la parolkapablo; el la gramatiko oni denove tuŝis kelkajn pli gravajn kaj relative malfacilajn demandojn.

Apartan feliĉon havis la gekursanoj en la triagrada grupo. Dektri tagojn ili aŭskultis lecionojn de prof. d-ro István Szerdahelyi (Istvan Serdahej), gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato. Prof. Szerdahelyi faris altnivelajn lekciojn pri E-metodiko kaj E-literaturo kaj gvidis la metodikan praktikon de la kandidatinstruistoj. Post



lia forveturo bonegajn lekciojn en la sama grupo faris niaj elstaraj samideanoj Atanas D. Atanasov — vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj Ivan Sarafov — sekretario de CK de BEA. S-ano Atanasov lektiis pri la historio de la internacia kaj enlanda E-movado kaj s-ano Sarafov — pri la organiza, kulturkleriga kaj propaganda laboro de la esperantistoj kaj pri la bulgara E-literaturo.

Specialajn lecionojn pri E-kantoj en ĉiuj grupoj havis k-do Jordan Markov — sekretario de la Instruista Sekcio. La kantoj variigis kaj plivigligis la laboron.


Dank' al la sukcesaj klopodoj de la kursa estraro certigi seriozajn kaj spertajn lektorojn, la instruado en ĉiuj grupoj estis altnivela. Inter la gekursanoj kreiĝis granda entuziasmo, ekflamis nobla konkurado por pli bonaj atingajoj en la lernado. Ĉio ĉi donis siajn bonajn rezultojn: la ekzamenon per supera lingvo-kono faris sukcese 75 gekursanoj, diplomojn por instrurajto ricevis 7 (5 kursanoj jam estis diplomitaj, 7 ne ekhavis la rajton fari parolekzamenon pro ne bona skribekzameno).

Al ĉiuj, kiuj plej bone lernis en la grupoj, la kursa estraro disdonis premiojn. Du el la tria grupo — k-no Vâlka Dankova el Popovo kaj k-do Prodan Predanov el Sofio — estis premiitaj per ekskurso al eksterlando.

En la Kulturdomo de la Sindikatoj la gekursanoj aranĝis 3 vesperamuzojn — unu el ili adiaŭa kun d-ro Szerdahelyi. Dum ĉi tiu vespero oni esprimis varman dankon kaj prezentis memordonacojn al li pro lia altkvalita kaj sindona laboro en la kurso. Kortuŝita pro la esprimita danko kaj amo nia altestimata gasto kaj fama E-pedagogo respondis jese al la invito denove veni en nian landon kaj partopreni la laboron de niaj porinstruistaj kursoj.

Bonan atenton al nia laboro montris ankaŭ la loka socio. Ĝi helpis nin. Okazis renkontiĝo inter la administra kaj metodika estraro de la kurso, inkluzive d-ron Szerdahelyi, kaj la lokaj gvidantoj: la unua kaj dua sekretarioj de la Urba Komitato de BKP, la prezidanto de la Urba Soveto, reprezentantoj de Bulgara Telegrafa Agentejo, de la loka ĵurnalo k. a. Estis interŝanĝitaj pensoj pri la estonta organizado de la somera kurso, pri plibonigo de ĝiaj materialaj kondiĉoj, pri fortikiĝo de la E-movado en Godeĉ k. a.

La sistemo de sepmonata foresta kurso, sekuita de 20-taga ĉeesta kurso, pruviĝis kiel bona, jam elprovita sistemo de lernado de Esperanto, tre konvena por la instruistoj. Ĉi tiu sistemo de laboro devas esti daŭrigata ankaŭ estonte, senĉese kaj ĉiuflanke perfektigata: la instruoprogramoj devas esti pli science ellaboritaj; ĉe la kurso oni devas krei solidan bazon de instruhelpiloj — lernolibroj, legolibroj, biblioteko el metodika kaj alia literaturo, modernaj



K. Văleo enmanigas la premion al k-ino Jordanka Serafimova el Veliko Târnovo

teknikaj rimedoj kiel magnetofono, gramofono, diafilmoj, metodikaj bildoj kaj aliaj pervidaj instruiloj; la metodika laboro devas ĉiam pliboniĝi, la ekzamensistemo — perfektigi. La ekzamenoj devas esti seriozaj, la postulemo al la ekzamenatoj devas plialtiĝi, por ke la diplomitoj ne kompromitu nian aferon, sed inde respondu al la ĉiam pli kreskantaj postuloj. Unu el la tre gravaj taskoj de la kursa estraro estas: tiel plibonigi la tutecan laboron kaj kondiĉojn de la somera kurso, ke ĝin plezure partoprenu ankaŭ eksterlandaj geinstruistoj.

Ni kredas, ke la kursa estraro laboros kun ne malpli granda energio kaj persisto ol ĝis nun kaj ke ĝi sukcesos solvi pli bone, pli altkvalite la novajn taskojn. La granda celo meritas ĉiajn kaj ĉies streĉojn kaj oferojn.

Kunĉo VĂLEV

metodika gvidanto de la porinstruistaj E-kursoj

La 12. VII k. j. forpasis en Ŝumen

Ljuben Todorov Kaŝĉiev

membro de la loka E-societo „Vekiĝo“ de 1923 j. Pro sia multjara aktiva agado kiel esperantisto li estis honorita de la Prezidentaro de la Parlamento per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — II grado.

La homamo kaj la fideleco de k-do Kaŝĉiev al la afero de la socialismo kaj Esperanto estos ĉiam bona ekzemplo por ĉiuj.


BERLINO — ĈEFURBO DE GDR

de Herbert Pilzecker

Iam fiŝista vilaĝo, poste komercista urbo, rezidejo de princoj kaj fortikaĵo, Berlino iĝis unu el la gvidaj politikaj, kulturaj kaj industriaĵurboj de la mondo. Post la pereo de la naziregno en 1945 Berlino estis la plej granda ruinejo de la Dua Mondmilito.

Berlino, la ĉefurbo kaj la kultura centro de la Germana Demokratia Respubliko, estas unu el la plej grandaj konstruejoj en meza Eŭropo kaj evoluis dum la pasintaj du jardekoj al impona centro de socialisma Germanio.

La ĉefurbo de GDR ampleksas preskaŭ la duonon de la estinta teritorio de Berlino, kies okcidenta parto apartiĝis de la urba tutaĵo jam mallonge post la Dua Mondmilito pro la arbitraj decidoj de la okcidentaj okupaciaj potencoj, rezidantaj tie ankoraŭ hodiaŭ. Ĝi nun formas la memstaran politikan unuon Okcidenta Berlino. Ekde 1961 ekzistas firma kaj sekura limo inter la ĉefurbo de GDR kaj Okcidenta Berlino, garantianta senĝenan konstruon de demokratia Berlino.



La ĉefurbo de GDR nombras 1,1 milionojn da loĝantoj kaj estas sidejo de la popola parlamento—la plej alta popola reprezentantaro de GDR, de la Ŝtata Soveto kaj de la Ministra Soveto.

Berlino estas la centra sidejo de ĉiuj patriotoj kaj amasorganizaĵoj de GDR, same de la centraj ekonomiaj gvidestraroj.

Ĉefbranĉoj de la Berlina industrio estas la elektrotekniko, la kemia industrio, la maŝinkonstruado kaj la vestaĵindustrio. La jara produkto de la ĉefindustriaĵoj uzinoj ampleksas 7 miliardojn da markoj.

Restarigi la kulturen vivon de Berlino post la milito ŝajnis preskaŭ nebla. La plej multaj teatroj estis detruitaj, likviditaj la artistaj ensembloj, pereintaj multaj artistoj pro la naziteroro kaj la milito. Kaj tamen Berlino travivis artivan prosperon senkomparan. Bertolt Brecht fondis en 1949 la „Berlinan Ensemblon“, du jarojn antaŭe Walter Felsenstein malfermis la „Komikan Operejon“. Ambaŭ scenejoj hodiaŭ apartenas al la plej renomataj en la mondo.

El la ruinoj novstarigis la Ŝtata Operejo — krom la Germana Teatro unu el la plej reprezentaj scenejoj de la GDR-ĉefurbo. Entute la vizitantoj povas elekti inter 13 teatroj. 32 kultur- kaj klubdomoj kun multfaceta arteca kreado de laikoj ofertas aranĝojn kaj eblecojn por ĉiuspecaj priartaj okupiĝoj.

Jam estas proverba la amo de berlinanoj al la rapideco. Ĉiutage la publikaj trafikiloj transportas 1,65 milionojn da homoj. La plej grava amastrafikilo estas la elektra urbo-rapidtrajno. La tramo trafikis 22 liniojn; omnibusoj kaj trolebusoj havas 33 liniojn.

Berlino havas multajn vizaĝojn: ĝi estas industriurbo kun 650 entreprenoj, urbo de arto kun multaj teatroj, muzeoj kaj eldonejoj, ripozejo kun multaj arbaroj kaj lagoj. Ĝi estas ankaŭ urbo de studentoj. La Humboldt-Universitato kaj la pluraj altlernejoj altiras ĉiujare dekmilojn da junaj homoj al Berlino, same kiel la fakaj inĝenieraj lernejoj. Sed precipe Berlino estas la ĉefurbo de ekfloranta lando — la ĉefurbo de la Germana Demokratia Respubliko.

El „Panorama GDR“

Rigardo de Karl-marks-aleo al la favorato de la berlinanoj — la 365-metra televida turo



LA TREZORO

Patro mortis. Antaŭ ol forlasi la mondon, li diris al siaj tri filoj:

— Amataj infanoj! Vi heredas nur mian kabanon kaj nian ĝardenon. Sed en ĉi-lasta kuŝas granda trezoro. Fosu diligente kaj certe vi trovos ĝin.

Post la morto de la patro la filoj traserĉis la tutan ĝardenon tre fervore. Sed ili trovis **nek** oron, **nek** arĝenton. Anstataŭ tio ili rikoltis grandegan amason de fruktoj. Nun ili komprenis, kion opiniis la patro, kiam li rakontis al ili pri la trezoro. Kaj ili ĉiujare refosis tre bone la ĝardenon kaj rikoltis multan monon.

СЪКРОВИЩЕТО

Един баща почина. Преди да напусне света той каза на своите трима синове:

— Любими деца! Вие наследявате моята колиба и нашата градина, но в последната (в градината) лежи голямо съкровище. Копайте прилежно и сигурно ще го намерите.

След смъртта на бащата синовете претърсиха доста усърдно цялата градина. Но не намериха нито злато, нито сребро. Вместо това прибраха голяма купчина плодове. Сега те разбраха какво е мислил бащата, когато им е разказвал за съкровището. И всяка година прекопаваха много добре градината и спечелиха много пари.

Elektis Kovo

MEMORE AL NIAJ E-HEROOJ VELA KAJ STOJU

La 14-an de junio j. k. la E-societo en Velingrad okazigis celebradon de la pereintaj ĉi tie partizanoj-esperantistoj Vela Peeva kaj Stoju Kalpazanov. Por la celebrado venis e

Sofio grupo de 20 esperantistoj-turistoj.

Malrapide, sed obstine grimpis la esperantistoj al la ekzekutloko de Stoju. Jen ĉi tie en la granda arbaro la murdistoj pafmortigis sian viktimon dorsflanke. En sia memorpharolado s-ano Peŝterski priskribis la heroan batalon de tiu arda adepto de la Internacia Lingvo. Nun la urba E-societo portas lian nomon.

Posttagmeze ni klinis la kapojn antaŭ la pereoloko de la popola heroino Vela. Ies dankaj manoj estis ornamintaj per verdaj standardoj la solecan tombon kaj la memortabulon. K-do Godev rakontis pri la vivo de la heroino, pri ŝia partopreno en la studentaj bataloj kontraŭ la monarkofaŝisma reakcio, pri ŝia lasta interbatiĝo kun la feroce malamiko. Per unuminta silento nia grupo esprimis sian profundan respekton al la fidela filino de nia liberama popolo.

Teksto kaj foto: *Dim. Mutuŝev*



Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta Komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Dimitr JĎRAKOV, Venelin MITEV, Dimit MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

En ĵ. „**Na preden post**“ — Godeĉ (20. I. 1970) artikolo „Placo Esperanto“ en Godeĉ“ (tradukita el „Bulgara Esperantisto“ N 11/1969).

En la sama ĵurnalo (1. VI. 1970) — artikolo „Someraj E-kursoj en Godeĉ“ kun elstaraj instruantoj, inter kiuj d-ro Szerdahelyi el Budapeŝto kaj Kunĉo Vălev el Sofio.

En ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ (16. V. 1970) — artikolo de Cvjatko Todorov pri la pacagado de la esperantistoj en Ŝumen.

En la sama ĵurnalo (20. VI. 1970) — informo de Cvjatko Todorov pri la prelego de At. Bojaĝiev — „Impresoj el Sovetunio“.

En ĵ. „**Narodno delo**“ — Varna (4. VI. 1970) — sciigo pri E-kunveno kun prelego „Impresoj el Istanbul“.

En ĵ. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (11. VI. 1970) — preskaŭ la tuta kvara paĝo estas dediĉita al la varia agado de Lernanta E-societo „Verda Raketo“ en Vraca kun kelkaj bildoj kaj la portreto de ĝia gvidanto Bojĉo Mladenov, instruisto.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ (16. VI. 1970) — sciigo, ke la Prezidiumo de la Parlamento distingis la konatan esperantiston Atanas Petrov Lakov per la titolo „Merita aganto de la agrikultura mastrumo“.

En la sama ĵurnalo (24. VII. 1970) — sciigo pri la renkontiĝo de profesoro Istvan Szerdahelyi el Budapeŝto kun la socio de Godeĉ.

En la sama ĵurnalo (1. VIII. 1970) en la artikolo „Aleksandr Ĵendov-Stepaniĉ“ la aŭtoro Georgi Karaslavov interalie rakontas pri la agado de la esperantistoj en la pasinteco, kiuj tradukis rakontojn de Karaslavov.

En la sama ĵurnalo (4. VIII. 1970) en la rubriko „Mallonge“ — informo, ke en Vieno oni solene inaŭguris la 55-an UK de Esperanto kun partopreno de pli ol 2000 esperantistoj el 46 landoj. Salutparoladon en Esperanto faris la prezidanto de Aŭstrio Franz Jonas.

En la sama ĵurnalo (7. VIII. 1970) du informoj: 1. „Sukceso por la bulgara arto“ — pri la spektaklo de Bulgara E-Teatro dum la 55 UK en Vieno; 2. „Esperantistoj el 10 landoj ŝanĝas sperton“ — pri la malfermo de la internaciaj E-kursoj en Pamporovo.

En la sama ĵurnalo (10. VIII. 1970) informo, ke la kongreso de la esperantistoj finiĝis, ke aperis la ilustrita vortaro de E., kaj ke la 56-a UK okazos en Londono en 1971.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ (29. VI. 1970) — sciigo pri la E-kursoj en Pamporovo.

En ĵ. „**Ustrem**“ — Svoge (30. VI. 1970) — artikolo de Jordan Atanasov, instruisto — „Esperanto prosperas“.

En ĵ. „**Veĉerni Novini**“ (4. VII. 1970) en la rubriko „El ĉie“ — sciigo, ke en la mondo estas 7 milionoj da esperantistoj, oni eldonis

7000 E-titolojn (librojn) kaj aperas ĉirkaŭ 100 gazetoj.

En la sama ĵurnalo (30. VII. 1970) — artikolo de Julia Bogdanova „La sezono estas fermita, sed . . .“ la aŭtorino rakontas pri la preparaj laboroj de E-teatro, kiu partoprenos en la 55-a UK de Esperanto en Vieno.

En ĵ. „**Narodna Mladej**“ (7. VIII. 1970) — artikolo „Sukceso de la Bulgara Teatro“ — pri la partopreno de Bulgara E-Teatro en la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, kiu prezentis la komedion „Virina Regno“ de la konata bulgara verkisto St. L. Kostov.

La 26. VI. 1970 forpasis en Sevlievo nia fervora samideano

Hristo Ganĉev Simeonov

esperantisto de 1927 j., multjara kaj agema membro de la estraro de la loka E-societo. K-do Simeonov tre bone regis la Internacian Lingvon kaj sindone laboris por ĝia disvastigo.

Излязоха от печат и се намират в книжарниците на Българската есперантска кооперация, София, ул. Неофит Рилски № 18:

1. Учебник по есперанто от *Ив. Захариев*, цена 1 лв.

2. Есперанто-български речник, джобен формат, от *Асен Григоров*, цена 0,50 лв.

В най-скоро време излиза от печат и **Българско-есперантският речник**, джобен формат, от *Асен Григоров*.

Есперантисти, снабдете се навреме с тези ценни и практични помагала!

Поръчки до кооперацията: ул. Неофит Рилски № 18, София.

Сумите, плюс 10% пощенски разноси, превеждайте с пощенски запис на името на кооперацията.